

DENOVE PRI INFORMADO

Funde trarigardante la materialojn de la "Informa Kolekto" de la lastaj jaroj, oni povas rimarki, ke malgraŭ la abundo de priesperantaj ~~artikoloj~~, ilian enhavon diktas nur du ĉefaj temoj:

- a) kiel bele, bone, facile estas paroli la helplingvon E kaj
- b) kiel belaj, bonaj, neripeteblaj impresoj estis dum la lasta renkontiĝo.

Nur kelkfoje ekbriletas movada fulmeto, kiun ĝenerale tuj dronigas la inundo de malnoviĝintaj, preskaŭ ĉiam ripetiĝantaj faktoj. Oni povas legi la saman - ĉu gazeto estas de la 1960-a aŭ plej freŝa de la kuranta jaro.

La celo de ĉi artikoleto ne estas kritiki la enhavon de la aperigita materialo - oni volas nur iomete pritrakti la ^{aspekton} ~~enhavon~~ de la ^{aktiveco} ~~perigita~~ materialo ^{de nia agado}. Estas grava stingo, ke nun oni jam ne ĉiam rifuzas aperigi priesperantajn informojn, kaj nun nur de ni mem dependas, ke ĉi estu interesa al neinformita leganto, altnivela kaj bonkvalita. Trarigardante nuntempan gazetaron, tre ofte oni povas trovi terurajn misinformojn, gramatikajn nekorektaĵojn, falsan fanferonadon.

Ekzemple antaŭ kelkaj jaroj en iu latva regiona revuo aperis artikolo "Amikeco trans limej". Tre bone, impresoj estis raportita lasta renkontiĝo. Sed imagu la teruran efikon al leganto - 9 gramatikaj, informaj kaj stilaj eraroj. Per simila nekvalita laboro ni por ni mem aranĝas "ursan helpon", konstruas barikadojn de antaŭjuĝoj, kiujn poste ni mem devas heroece venki.

La saman oni povas diri pri ĉiuj rimedoj de la informado. Estas malfacile komprenebla la afero, ke sur paĝoj de niaj informeldonaĵoj oni ne tre ofte tuŝas temojn pri saĝa informado pri nia kara lingvo.

Permesu citi kelkajn paragrafojn, kiuj klare prezentas niajn celojn kaj metodojn, laŭ kiuj oni devas agi.

1. Celo

1. Tri branĉoj de aktivecoj: informado; instruado; praktika utiligo. Nur paralela, bone studita kaj celkonscia agado sur la tri kampoj povas doni kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro.
2. La celo de la informado: a) diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion, kio estas kreita en ĝi aŭ pere de ĝi; b) detruu la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo; c) instigi al lernado de la lingvo kaj altiri novajn adeptojn al la movado.

1. Metodoj

11. Diversaj eblecoj: a) artikoloj; b) mallongaj informoj (nepre objektivaj); c) publikaj prelegoj por ĝenerala publiko; d) prelegoj en specialaj medioj (sciencaj instancoj, literaturaj societoj), sindikatoj, studentaj kluboj, diversaj asocioj ktp.); e) radioprelegoj kaj informoj; f) afiŝoj; g) sloganoj; h) kepozicioj; i) filmoj; j) aliaj eblecoj laŭ la landaj aŭ lokaj cirkonstancoj.
12. Nur intensa utiligado de ĉiuj eblecoj paralele efikas pozitive.

Kvalito

13. Ĉefaj eraroj: a) nomi la lingvon artefarita, verda kaj helpa k.s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ La Internacia Lingvo aŭ Esperanto; b) superflue menciigi diversajn projektojn de komuna lingvo; c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili; ĝ) uzi en necilingvaj tekstoj Esperantajn esprimojn, ekz. "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" k.s.; d) skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo; e) nomadi la informadon pri Esperanto "propagando"; f) doni al la Esperanto-Movado sektecan karakteron (tre multe da steletoj kaj flagoj, kantsado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangejoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k.s.). La eraroj en la informado malproksimigas de Esperanto dekmilojn da personej kaj kaŭzis fortan kompromitigon de la movado en multaj medioj.
14. Por atingi la kvaliton estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturan kaj praktikan valorojn de la lingvo: literaturo, sciencaj verkoj, Someraj Universitatoj, Belartaj konkursoj, precipe helpe dum vojaĝoj kaj en profesia labore. La digno de ĉiuj publikaj aranĝoj respegulu la respekton, kiun la esperantistoj mem havas por la Internacia Lingvo.

Konstanteco kaj Kampanjoj

15. Konstanteco: La informado devas esti konstanta dum la jaro, por ke la publiko senĉese konsciu pri la ekzistado kaj funkciado de Esperanto.
16. Kampanjoj: Specialaj kampanjoj, kun utiligo de ĉiuj metodoj, devas esti farataj antaŭ la komencigo de la kursoj, okaze de kongresoj, je la Zamenhoftago kaj ĉiam, kiam per tio prezentigos taŭga okazo.

Medioj atingotaj

17. Generala Informado: Ĝi estas direktata al la larĝa publiko kaj havas la celon krei ĝeneralan favoran agordon.
18. Speciala Informado: Ĝi estas direktata al specialaj medioj, kies interesoj transiras la limojn de iliaj naciaj lingvoj (sciencistoj, diversaj fakuloj, komercistoj, membroj kaj adeptoj de internaciaj organizaĵoj kaj movadoj) kun precipa atento al la junularo kaj al la studentoj.

Konkludo

19. La esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la praveco de la propra afero kaj pli kuraĝe argumentu kontraŭ la eraraj prezentoj. Ĉiu esperantisto konstante klopodu larĝigi skaj atingi sian lingvan scion. Ĉiu esperantisto ĉiam portu la Esperantan insignon (ne multajn, sed unu). En fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj la esperantistoj levu sian voĉon. La informado estu ĉiam adaptita al la medio, en kiu oni faras ĝin, kaj venu prefere de tiu medio mem.
20. Ĉiuj branĉoj de informado estu egale atentataj kaj paralele aplikataj. La maniere de informado varias de unu lando al la alia kaj de unu medio al la alia. Sekve, tiuj ĉi bazaj principoj estu aplikataj kun elasteco kaj kun konsidero de la apartaj cirkonstancoj.
21. La tuta agado, paralela kaj harmonie kunordigita en la tuta mondo, havu daŭre la celon diskonigi la lingvon, instigi al lernado kaj praktika aplikado de Esperanto, venki la ŝlesilajn poziciojn en la kultura vivo kaj definitive favorigi la publikan opinion al Esperanto.

Ŝajnas, decia rememorigi al "veteranoj" kaj konatigi junajn aktivulojn kun ĉi paragrafoj de la "Fundamenta Principaro de Inf-

ormado pri la Internacia Lingvo", akceptitan jam en la 1956-a jaro en Frostavallen (Svedio).

Oni proponas ĉiam, kiam vi volas elpaŝi antaŭ neesperantista publika, ne forgesi almenaŭ §13. Ni ja ne havas tiom da amikoj de nia kara lingvo, ke ni rajtus senzorge ilin fortimigi.

A.Medinš (Riga).

ARGUMENTITAN KONTRAŬKRITIKON!

Dum la 1975 jaro en diversaj nialandaj urboj aperis multaj poresperantaj artikoloj kaj informoj: regule informas pri Esperanto, dank'al sineferema agado de k-do J.Gold, la centra organo (ruslingva) de la latvia komunista junularo "Sovetskaja Molodjoj", du artikolojn presis la revuo "Kulturo kaj vivo", la artikolon de k-do Isaev publikigis la revuo "Nova Tempo", aperanta kvinlingve; en multaj provincaj gazetoj aperis poresperantaj artikoloj kaj notoj.

Sed samtempe en iuj gazetoj aperadas piknotoj kaj ironiesaprimoj kontraŭ Esperanto. La aŭtoroj de tiuj ĉi fi-informoj, senescepte, montros sin absolute malkompetentaj kaj sciantaj nek la lingvon, nek la Esperanto-movadon.

Estas tute nature, ke esperantistoj ne lasas sen responde tiujn ĉi atakojn kaj sendas klarigajn kaj protestajn leterojn al la respektivaj redakcioj. Tio estas necesa: neniu atako sen kontraŭatako! Sed, bedaŭrinde, kelkaj esperantistoj en siaj leteroj, krom argumentoj kaj eĉ anstataŭ ili, uzas insultajn esprimojn kaj ofendajn epitetojn. Ni konsideras plej necesa atentigi tiujn ĉi kamaradojn, ke ili, dezirante bonon al la Esperanto-movado, kaŭzas grandan malutilon al ĝi. Rezulte jam kelkaj ĵurnaloj kaj revuoj fermis siajn perdojn por esperantistoj.

La insultoj estas signo de malforteco kaj foresto de konvinkigaj pruvoj kaj nur kompromitas nian movadon kaj bremsas ĝin. Simile reagas fanatikuloj-kredantoj, kiuj superŝutas la aŭtorojn de ateistaj artikoloj per insultoj kaj malbenoj. Per tio ili nerefuteble pravas, ke en ilia dispono forestas kaj ne povas ne foresti science bazitaj argumentoj, kapablaj defendi iliajn falsajn kaj trompajn konceptojn. Ni ne imitu tiujn ĉi fanatikulojn kaj ne helpu al niaj kontraŭuloj kreadi opiniojn pri esperantistoj kiel sektantoj.

Por konvinka, argumentita kontraŭkritiko

D.L.Armand (Moskvo),
A.S.Harkovskij (Moskvo),
L.V.Medvedev (Moskvo),
S.N.Podkaminer (Leningrad).

D-ro István Szerdahelyi

INSTRUADO DE ESPERANTO Nunaj problemoj

Kvankam ni estas petita verki pri moderna "metodologio", mi preferas paroli pri ~~la~~ "nuna". Ĉiu metodologia koncepto estis siatempe "moderna".

Tamen: oni ofte aŭdas pri "modernaj metodoj", kaj ĉiam evidentiĝas, ke ĉi-tempe oni ĉiam konsideras nur la teknikan, pli ĝuste teknologian problemon, la sistemon de rimedoj, la ilaron. Estas ofta fenomeno ekz., ke instruanto eniras en la klason kun plena valizo de diversaj ludiloj, bestetoj k.s. kaj pensas, ke per tio lia instruado fariĝos "Ĉseh-metoda". La demonstriloj estas tre gravaj, sed ne unuaj faktoroj de la tre kompleksa problemaro.

1.1. Ne ekzistas ŝtata lerneja sistemo en la mondo, en kiu ne estas integrita, kiel studobjekte, iu fremda lingvo. Estus ege interese ha

avi ekzaktajn statistikajn indicojn pri tiuj grandtrafikaj lingvoj, kiuj estas instruataj kiel fremdaj lingvoj en la plej granda parto de diversaj ŝtatoj. Tiu ĉi indico esprimus fidele la interlingvan internacian valoron de la koncerna lingvo, multe pli ol kiu ajn alia cifero.

1.2. Ne ekzistas ŝtata lerneja sistemo, en kiu Esperanto estas organike integrita kaj devige, egalrajte instruita.

1.3. Ekzistas multaj lingvoj, kiuj nenie en la mondo estas enkadritaj en la lernejoj kaj instruataj kiel fremdaj lingvoj (ekz. mia gepatra lingvo - la hungara). Sed ĉiuj tiuj lingvoj havas siajn proprajn etnajn mediojn, kie ili vivas, funkcias, evoluas. Esperanto estas kreita ĝuste por esti "fremda lingvo" en diversaj lernejoj, ĉar "gepatra" ĝi ne estas.

1.4. Neniam la organizita Esperanto-movado ekzamenis serioze la kialon de la punkto 1.2. Neniu ĉi-koncerna serioza analizo estis ĝis nun farita. La okdek-jara evoluo ĉi-koncerne egalas nulon.

Kvankam: Esperanto vivas, funkcias kaj evoluas nur sekve de ĝia instruado kaj lernado. La instruado kaj lernado estas la imperativaj vivkondiĉoj de la Internacia Lingvo, ĉar ĝi ne havas etnan medion, estas nenies gepatra lingvo stafete transprenita de gepatroj (la denaskaj esperantistoj estas kaj eble restos ĉiam nur esceptaj kazoj).

2.1. La instruado de Esperanto preskaŭ ĝis niaj tagoj havis la ekskluzivan celon: obligi la nombron de esperantistoj. Sed: estas intereso de Nederlanda ŝtato investi kaj zorgi pri tio, ke anstataŭ (ni diru) 500 esperantistoj estu mil? Kion profitas el tio la ŝtato mem? Des pli, ke tiuj esperantistoj disvolvos poste sian aktivecon ne en la "establita socio", sed ekster ĝi, en la aparta, artefarita satelito, iaspeca fantazia soci-sputniko, kiu jam 80 jarojn turniĝas ĉirkaŭ la organizita mondo.

2.2. Tiu fiktiva "Esperantujo" vivas sian propran, apartan vivon, ^{ĉe} ~~la~~ ~~esperanto~~ ~~instruado~~ ~~de~~ ~~la~~ ~~ŝtato~~ ~~de~~ ~~Nederlando~~ ~~kiu~~ ~~dirite~~, estas plialtigi la nombron de la loĝantaro, disvastigi la limojn de Esperantujo, ĝis kiam - laŭ la febra fantazo de ekstremaj utopistoj - tiu satelito englutos la establitan mondon mem - kaj estos unu lingvo - kaj unu homaro.

2.3. La nuna postulo estas: klopodi, ke normalaj homoj alproprigu la internacian lingvon kaj uzu ĝin en sia normala, ĉiutaga vivo: kaj privata, kaj oficiala. La direkto estas inversa: ni klopodu enigi Esperanton, ĉelon-post-ĉelo en la establitan mondon, ĝis kiam ĝi tute disolvigos en ĝi kaj plenumos siajn specifajn funkciojn ne ekster, sed en ĝi.

3.1. La plej konkreta kaj ŝajne la plej alirebla vojo kondukas tra la lernejo. La fakto, ke oni de tempo-al-tempo permesas almoze instrui Esperanton en iu aŭ alia lernejo inter diskriminacie limigitaj kadroj - kiel spertite el la 80-jara historio - preskaŭ nenion kontribuas al la solvo. La celo estas, ke Esperanto en ĉiu lerneja sistemo havu la saman statuson, kiel la aliaj interlingve uzataj, grandtrafikaj lingvoj. Por atingi tiun, kvalite jam alian celon, ni bezonas tute novajn, modernajn rimedojn.

3.2. Antaŭ ĉio oni devas eksperimente demonstri kaj ekzakte pruvi la pedagogiajn, didaktikajn kaj praktikajn valorojn de Esperanto, kiel lerneja studobjekto. Se surbaze de seriozaj dokumentoj la ŝtataj instancoj konvinkigos, ke:

3.2.1. Esperanto, kiel lerneja studobjekto enhavas valorajn pedagogiajn elementojn, kiuj kontribuas al la efektiveco de la ĝeneralaj popolklerigaj edukaj celadoj;

3.2.2. Esperanto kontribuas al la solvo de diversaj, hodiaŭ ankoraŭ nesolvitaj kaj kelkfoje eĉ nesolveblaj didaktikaj problemoj;

3.2.3. fine: Esperanto malfermas novajn formojn de aktivecoj en la vivo de ĝelernantoj kaj enhavas praktikajn utilojn - tiam la regis-

taroj pli serioze pripensas la demandojn pri ĝia ĝenerala enkonduko, emancipigo kaj plena egalrajtigo.

3.3. Tia aktiveco jam disvastiĝas - plej ofte ekster la organizita Esperanto-movado. Ni citu kelkajn ekzemplojn: O.Tzaut en Svislando, P. Järvinen en Finnlando, d-ro H. Frank en Federacia Respubliko Germanio, d-ro M. Dazzini en Italio, d-ro P. Zlatnar en Slovena Soc. Respubliko (Jugoslavio), Ib Schleicher en Danlando - kaj tiun vojon elektis ankaŭ la kvinlanda Kuna Konferenco per ĝia Pedagogia Didaktika Eksperimento. La eksperimento finiĝis, nun ni analizas la rezultojn, por povi liveri konkretan materialon al la interesitaj Ministerioj. Ni esperas, ke ni sukcesos kunvokigi iun super-nivelan oficialan konferencon por registare pritrakti la problemon kaj trovi ĝian difinitivan solvon. Laŭ niaj ĝisnunaj spertoj tute ne la registaroj kulpas pri tiu situacio, en kiu nun troviĝas la lerneja statuso de Esperanto: multe pli la organizita Esperanto-movado, kiu dum 80 jaroj ne sukcesis trovi la ĝustan kanalon kaj la adekvatajn rimedojn por atingi sian propran celon. Ofte eĉ oni povas rimarki, kvazaŭ mem la esperantistoj tion ne velus fari.

Resume. Antaŭ ol paroli pri modernaj rimedoj de la instruado ni devas havi eblecon kie ĝin apliki kaj al kiuj. En nia lerneja politiko nunmomente malpli gravas la ilaro, ol la ĝusta koncepto kaj adekvata al ĝi strategio, por enigi Esperanton en la oficialan lernejsistemon de la unuopaj ŝtatoj.

"Heroldo de Esperanto", №11, 1975.

Sendis N. Starodubcev, estro de la Lerneja fako.

PRI LA UTILO DE ERAROJ (Ĉetomba parolo)

Pace forpasis la multkriema URSA-Komitato, ne ekzistinte eĉ jaron. Demetu la ĉapelojn. Ne nur por esprimi kondolencojn, sed por ke la konkludoj el ĝia morto pli bone penetru viajn kapejojn.

Kio estis la forpasinto? Dum renkontiĝo en Zaporoĝje en 1974 krom dezirantoj amuzi sin kolektiĝis ankaŭ homoj, strebantaj priparoli problemojn de la Movado en sovetia kaj ukrainia skalo. Malgraŭ la organizaj mankoj, certaj homoj sukcesis okazigi "kuluaran konversacion". Ĉiuj konsentis, ke la aferoj en SEJM statas malbone, en Ukrainio - tereure. La Konsilantaro de SEJM ne venkas gvidadon de la konstante plimultiĝanta kvanto da SEJM-aj kluboj. Tial necesas en la konstruado de la Movado enigi ankoraŭ unu etagon - regionajn konsilantarojn. Do, la ĉefa SEJM-a Konsilantaro gvidu la regionajn, kaj ili gvidu simplajn mortulojn.

La ideo mem estis bonega. Kaj la premisoj ĝiaj estas veraj. Regionaj gvidantoj efektive pli bone komprenas la lokajn situaciojn, pli bone konus la lokajn homojn, pli konformajn planojn ellaborus (en SEJM praktike forestas bonaj planoj), pli plene realigus tiujn planojn.

Estis proponita eksperimento. La tuj elektita provizora komitato (oĥ, ŝatas ni titolajn!) ellaboris planojn, proponojn, strukturon ktp.

La unua decida renkontiĝo estis organizita printempe 1975 en Doneck. Plej arde elpasis por neceso de rekonstruo kaj reorganize M. Belogolevskij. Lin firme subtenis Ju. Lupickij, Ju. Muraŝkovskij, S. Miŝĉenko, A. Sakoviĉ, M. Lineckij, ne tre firme O. Kerzjuk, ne kontraŭis N. Starodubcev, V. Noĉovkin, A. Rogov kaj kontraŭis D. Kolker. La aliaj ĉestintoj silentis kaj ne komprenis pri kia temo.

Estis elektita la unua URSA-Komitato. Ĝin eniris: M. Belogolevskij - prezidanto, Ju. Muraŝkovskij - sekretario, S. Miŝĉenko - vicprezidanto pri kulturaj aferoj. Surlokaj reprezentantoj en Ĥmelnickij, Poltava kaj Ĥarkov estis respektive O. Kerzjuk, V. Noĉovkin, Ju. Lupickij.

La planoj estis vastaj kaj bazis sin sur la doktrino: por la Movado vive necesa estas sociutila agado. La Komitato ekkontaktis kun loka pekkomitato, organizis tradukadon de artikoloj pri la 30-a jaro

de la Venko kaj pri la sovetaj virinoj, komencis kompili ukrainian kantareton, ukrainian E-arkivon, arde ekdeziris plenumi ĉiujn proponojn de la SEJM-Konsilantaro antaŭ ol aliaj kluboj.

Kaj tuj aperis kontraŭuloj. Ekaŭdinte soneron, sed ne sciante de kie, eksplodis M. Bronŝtejn. Li decidis, ke URSA apartiĝas de SEJM, elpensis por la ĵus naskita ^{morte} pekojn kaj kulpigis je ili. Belogolovskij dum SEJT-17 provis ion rakonti pri taskoj kaj planoj de la URSA-Komitato, sed eĉ tra folioj de la protokolo, kiun li poste montris al komitatanoj, videblis nefidemo.

Kaj aperis la unua kaj la lasta samtempe muro, trabatante kiun la URSA-Komitato rompis sian kapon: nedisciplinemo de la anoj. SEJM estas pli granda, pli dikhaŭta kaj malpli arda - ĝi eltenas. La juna, nesperta URSA-Komitato forpasis. Kaj ni, starintoj ĉe la lulilo kaj atestantoj de la morto, devas ne nur verŝadi abundajn larmojn, sed fari certajn konkludojn kaj rakonti pri ili al ĉiuj.

La sperto de la ekzistado de la URSA-Komitato klare montris, ke enigi ankoraŭ unu etaĝon en la SEJM-an strukturon estas antaŭtempe. Por ke ajna simila organizaĵo povu ekzistadi, necesas havi en ĝi minimume dekojn da aktivuloj. La Komitato havis nur 5-7 ne tre klare komprenantajn. Organiza laboro estas necesa nur tiam, kiam estas laboro, kiun indas organizadi. En Ukrainio tia laboro mankas.

Kiam post la dua renkontiĝo en Doneck M. Belogolovskij ekkoleris, neniom dubante kulpigis Ju. Lupickij-on pri tio, ke nur li ĉiujn konvinkis organizi la Komitaton, kaj ekkriis, ke li plu ne vo..., plu ne dezi..., la URSA-Komitato ĉesis la ekzistadon. Nur unu konkludon oni povas fari el tio: la URSA-Komitato ne estis bezonata.

Sed jenon mi velus aldoni. Dum la SEJM-Konferenco ekupiĝas pri duonvena kaj preskaŭ ne plenumata babilado, dum M. Bronŝtejn timigas ĉiujn per "perfiduloj", la ferpasinta Komitato ion provis, ion faris, trovis interesajn vojojn. Anstataŭ kulpigi aŭ priridi niajn gvidantojn prefere pristudu la rezultojn de tiu vere "ursa" eksperimento, kaj mi certas, ke oni trovas multon utilan. Kaj ne forgesu, ke trovas nur tiu, kiu serĉas, sed ne tiu, kiu kritikas serĉantojn. Dum eĉas ridoj pri la nesukcesa eksperimento en Ukrainio, jam komenciĝis la dua. Ĉu ĝi vivos, ĉu mortos - la estonte montros, sed eĉ en la plej malbona okazo SEJM ĝuste, praktike scias, kiu vojo estas neniena.

Sed ts-s! La gardantoj de nia moralo ne dormas. Ili pretas prijuĝi novan provon, eĉ ne sciante, pri kio temas. Tial mi dume detenas min kaj ne rakontos pri la nova eksperimento, des pli, ke mi ne estas inter la organizantoj de ĝi, sed nur inter viculoj. Kaj, se la dua ankaŭ estos nesukcesa, ni komencos trian ktp. Se ni ĉiuj nin nutros per rememoroj - la Movado pereos. Ni preferas rompi frunton, serĉante vojon, ol stari kaj atendi semolinon ĉielan, revante pri reveno de la ora tempo de nia junece.

Estinta sekretario de la estinta URSA-Komitato
Julio Muraŝkovskij (Ĥarkov).

SIMBOLAJ TENDARANOJ

Ĉiujare okazas tiel, ke kelkaj personoj, kiuj ege velus partopreni SEJT-on, pro diversaj cirkonstancoj tamen ne sukcesas efektiviĝi la intencan, malgraŭ ke ili sendis aliĝilejn kaj aliĝmonon al la Prepara Komitato.

En agado de UEA estas tia, laŭ mi, bona kutimo: se aliĝinto ne venas por partopreni Universalan Kongreson, la aliĝmonon li ne ricevas, tamen li ricevas ĉiujn informojn: la programon, la Kongresan Libron ktp, kaj post la Kongreso al li estas sendataj la kongresa insigno kaj aliaj prikongresaj informoj. Kaj sufiĉe ofte okazas ankaŭ tiel, ke multaj homoj, ne havantaj eblecon persone partopreni Universalan Kongreson, tamen aliĝas al UK por ricevi pri ĝi ĝustatempe ĉiujn

informojn kaj insignojn, blazonojn ktp. Kaj tiaj simbolaj aliĝintoj jam estas tute normala fenomeno en la internacia skalo de E-agado.

Kaj jen mi venas al konkludo: eble ni ankaŭ devus enkonduki tiun specon de aliĝo al niaj SEJT-oj kaj Konferencoj kiel s i m b o l a aliĝinto. Ja pluraj kategorioj de laboruloj pro specifeco de sia laboro kaj ankaŭ homoj el foraj partoj de nia vasta lando, kiel ekzemple Kamĉatka kaj Ekstrema Oriento, ne havas eblecojn ĉiujare partopreni SEJT-ojn, sed ili ĉiam havas kelkajn "superflujajn" rublojn, kiujn ili povas sendi por la simbola aliĝo al la E-arango, por ricevi ĝustatempan informon, insignon tendaron kaj ĉion alian, kion la alveninto ricevas de la Prepara Komitato. Kaj tio povus esti utila ne nur por la "simboluloj" mem, sed ankaŭ por la Prepara Komitato, ĉar ja estus alvenintaj aldone multaj rubloj, tiom bezonataj por bone prepari la tendaron. Kaj tiu aldone mono pestulas post la finiĝo de la tendaro nur kelkajn kromajn kovertojn, por sendi al tiuj bonvolemaj esperantistoj liston de la SEJT-partoprenintoj kune kun kelkaj ceteraĵoj, kiuj tamen estas ege valoraj por tiuj, kiuj ne sukcesis veni al la tendaro, sed ĉiam avidas tion fari.

V.Bespalov (Soĉi).

RIGA ESPERANTO-UNIVERSITATO

Venis tempo, kiam Riga Junulara E-klubo ekbezonis jam profesiajn E-instruistojn, kiuj vere konscias la gravecon de ĝusta kaj saĝa instruado de la Internacia Lingvo. Laŭ praktiko ni scias, ke hazarde trovitaj volontuloj gvidi E-kursojn kaj rondetojn en lernejoj ankoraŭ ne kapablas doni al la Movado vere konvinkitajn adeptojn. Tial en Riga la 7-an de februaro 1976 ekfunkciis Esperanto-Universitato. Oni disdonis taskojn al niaj spertaj esperantistoj pri apartaj, sube menciitaj, temoj. De tio oni havas duoblan profiton: unue, la partoprenantoj de la Universitato havas praktikon serioze prelegi kaj due, aliaj aŭskultantoj posedas altkvalitajn konspektojn, kiuj povus esti uzablaj por ilia labore en lernejoj kaj por prelegoj al ĝenerala publiko.

Dum la Riga Esperanto-Universitato oni pritraktos jenajn temojn (estas aldonataj la familinomoj de la prelegantoj, por ke oni povu peti konsilon pri koncerna temo aŭ sendi al ŝi persono siajn proponojn, se in SEJM-klubo aranĝos similan eksperimenton):

1. Interlingvistiko - A.Kalnins;
2. Artefaritaj lingvoj - A.Silkalne;
3. Historio de la Esperanto-Movado (1887-1927) - S.Neilande;
4. Historio de la Esperanto-Movado (1927-1975) - T.Bercis;
5. Esperantaj literaturo, poezio, prozo (1887-1975) - A.Medinš;
6. Latva literaturo en Esperanto (1889-1975) - M.Burgmeistere;
7. Historio de la E-Movado en Latvio (1889-1975) - M.Burgmeistere;
8. Esperanto - lingvo de la scienco - A.Kalnins;
9. Esperanto-periodike - T.Bercis;
10. Esperanto-organizaĵoj - M.Burgmeistere;
11. Historio de UEA - S.Neilande;
12. Historio de SEJM - A.Medinš;
13. Esperanta gramatiko - A.Medinš.

Post fino de la Riga Universitato la aŭskultintoj plenumos superan ekzamenon en la Tartua ŝtata universitato por ricevi oficialan rajton instrui E-on en lernejoj.

Simila Esperanto Universitato estas organizita unue en la historio de Riga Junulara Esperanto-klubo. Ni estos tre dankaj, se spertaj esperantistoj sendos al ni siajn konsilojn kaj proponojn laŭ la adreso: Aristids Medinš, 226002 Riga-2, Ed.Smilĝa, 34-5, Latvio.

~~A.Medinš, rektoro de REU,
T.Bercis, dekano de REU (Riga).~~

El programo de la Riga E-Universitato

Por supera ekzameno studento de la E-Universitato, unue, devas bone scii la gramatikon. En la programo de REU oni studos plenan kurson, kaj estos aparta ekzameno. Oni proponas al ĉiuj seĵmanoj konatiĝi kun la demandoj de la ekzamenaj biletoj. Laŭ ĉi demandaro ni proponas instrui ankaŭ en grupoj de progresantoj.

Literaturo: H. Seppik - La tuta Esperanto; V. Auld - Paŝoj al plena posedo; Esperanto 1.

Sube estas proponata eltiro el la gramatika demandaro:

1. Kiujn vortspecojn havas la gramatiko?
2. Kiajn numeralojn oni distingas en Esperanto?
3. Kiom da tempo havas la konjugacio?
4. Kion vi scias pri konjunkcioj kaj subjunkcioj?
5. Kion oni devas scii pri la objekto?
6. Kiamaniere oni faras la vertojn en Esperanto?
7. Kion oni devas scii pri la interpunkcio?

(Entute la gramatika demandaro enhavas 49 demandojn. - Red.)

A. Medinš, rektoro de REU,
T. Bercis, dekanano de REU (Rigo).

PRI LABORO DE LA KOMITATO

Oni komisiis al mi iom informi pri la laboro de la SEJM-Komitato. La komitatanoj inter si tre ofte letercirkuleras kaj tiel solvas multajn demandojn, faras decidojn k.s. La interna korespondado estas tre afereca. Oni diskutas perletere pri ĉiuj gravaj demandoj. Krom tio dum ĉi agadjaro jam okazis du kunsidoj de la Komitato (ne konsiderante tiujn dum la tendaro). En Leningrado partoprenis 4 komitatanoj, en Vilnius - 5 (ĉiuj eŭropaj).

Certe, la kunsidoj estas pli bona formo de laboro, sed ofte ne estas facile organizi ilin. Pri la leningrada kunsido skribis M. Bronštejn. Dum la vilnia kunsido estis preparolitaj preskaŭ la samaj leningradaj demandoj escepte kelkajn. La plej grava demando estis la sekva SEJT kaj SEJM-Konferenco. Oni decidis eldoni "Tendaran Libron" lige kun la 10-jara jubileo de SEJM. Alia grava decido estas eldoni broŝuron pri SEJM per eksterseĵmanoj lige kun la 10-jariĝo. Komenciĝis diskuto pri aktivecoj de SEJM lige kun la Olimpikoj en Moskvo en 1980. Temis pri amasa ekzameniĝo ĉe prof. P. Ariste ĉu antaŭ, ĉu dum, ĉu post SEJT. Aldone oni parolis pri agado de seĵmanoj antaŭ kaj post la partia kongreso. Estis kontrolita plenumado de la laborplano de la Komitato (publikita en "A"-24). Konkludo - ĉiuj planeroj estas plenumataj, kvankam kelkaj pro objektivaj kaŭzoj iom malfruas. Estis preparolita demando pri eksterlandaj vojaĝoj de seĵmanoj, pacmovadaĵ aferoj ktp. Certe, oni diskutis kaj akceptis decidojn pri multaj aliaj aktualaj aferoj. Sekva kunsido de la Komitato okazos dum la martaj festotagoj.

Do, la Komitato laboras. Aktive agu ankaŭ ĉiuj seĵmanoj!

P. Jegorovas, Sekretario de SEJM.

INFORMLETERO N°1

pri la 18-a Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (SEJT-18)

La tendaro estas dediĉita al la 10-jara jubileo de Sovetia Esperantista Junulara Movado.

LOKO

La X-a jubilea Konferenco de la SEJM-Konsilantaro kaj SEJT-18 okazos en la orienta parto de Leningrada regiono (ĉ. 200 km. de Leningrad), sufiĉe proksime de la urbo Tiŝvin. La antaŭtendara Paroliga Periodo por ĉi-jaraj kursfinintoj ankaŭ okazos apud la urbo Tiŝvin.

TEMPO

La Konferenco kaj Paroliga Periodo okazos la 12-16 de aŭgusto 1976. La tendaro okazos la 17-26 de aŭgusto 1976.

PROGRAMO

La programo de SEJT-18 konforme al la Regularo de SEJT nepre enhavas Esperanto-instruado en ĉiuj niveloj. Krome okazos diversaj popracaj aranĝoj (inkluzive labortagon por la Pacfonduso), prelegoj, koncertoj, festoj, belartaj kaj sportaj entreprenoj kaj ankaŭ da similaj agrablaj programeroj.

KONDIĈOJ

Partoprenantoj de la Konferenco kaj Paroliga Periodo loĝos en kutimaj turistaj kondiĉoj (tendoj, dormosakoj, komuna kaldrono...), tamen la PE-anoj havas unu avantaĝon: ili ne sidos surloke, kiel la konferencanoj, sed marŝos dum kvin tagoj, kiel veraj turistoj. Loĝado dum la SEJT-periodo - en dometoj kaj parte en tendoj. Manĝado - en manĝejoj. Pri ĉiuj ceteraj kondiĉoj (partoprenrajto ktp.) legu en la Regularo de SEJT ("Aktuale"-8, 1975).

KOTIZO

Kiel kutime, ĝi estas duparta:

a) aligkotizo (por tendara insigno, emblemo, poŝtelspezoj ktp.) estas:

- 4 rb. por gelernantoj
- 5 rb. por gestudentoj
- 6 rb. por la ceteraj.

b) partoprenkotizo (por manĝelspezoj, littelaĵoj ktp.) estas 3 (tri) rubloj por ĉiu partoprenanto. Veni por neplena Konferenca kaj tendara periodo estas ebla, sed nedezirinda. La aligintoj, kiuj ne sukcesos veni, ricevos la parton "b" de la sendita kotizo.

ADRESOJ

La kotizojn kaj aligilojn sendu laŭeble pogrupo al Bronŝtejn Meisej Caleviĉ: 187500 Leningradskaja obl., Tiŝvin, glavpoŝta, sb. jaŝnik. 2.

Ĉiujn informojn petu de la sama persono laŭ adreso:

187500 Leningr. obl., Tiŝvin-3, 1-j Mikrorajon, 44, kv. 22,

aŭ de k-joj A.Kogan kaj V.Gakalenko (adreso en la Sekretaria Libro).

La aligiloj kaj la kotizoj estas akceptataj ĝis la 1-a de junio. La kotizoj kaj aligiloj, senditaj post la menciita dato estas resendataj.

Organiza Komisiono.

UNUA BULTENO

pri Baltia Esperanto-tendaro - 76

Ĉi-jara tradicia 17-a BET, kiu okazos en Litovio, estas dediĉita al la XXV-a Kongreso de KPSU kaj al la komenciĝinta 10-a jarkvino.

CELO de la tendaro - praktiki la Internacian Lingvon en amika, gaja medio.

PROGRAMO - semera universitato kun prelegoj pri politikaj, popularsciencaj, lingvaj kaj movadaj temoj, E-kurso, fakaj kunvenoj, libera tribuno, viva gazeto, lingvaj kaj sportaj konkuroj, artaj kaj literaturaj horoj, distraj paŝoj, spektado de lumbildoj kaj filmoj, ekskursoj, koncertoj k.a.

TEMPO - de la 30-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto.

LOKO - estos ĝustigita en la dua bulteno.

LOGADO - nur en komunloĝejoj. Ĉi sufiĉas por 200 personoj. Kosto-70 kop. por tagnekte.

MANGADO - en la surloka manĝejo, po 1,50 rb. tage. Krom tio en la urbo funkcias restoracio kaj vendejoj.

ALIGO - ĝis la 1-a de junio. Aligilo sen antaŭpago la tendarkotizon ne validas.

La tendarkotizo, kiu inkluzivas tranokton, manĝadon, senpagan ekskurson kaj aliĝumon, pageblas dumjare - aŭ per la tuta tempo sume 25 rb. aŭ per kvin tagoj, sume 14 rb. Per lernantoj respektive 23 kaj 12 rb. Pagante por 5 tagoj, nepre notu la precizajn datojn de via alveno tendaren.

Aliaj formoj de antaŭpago ne estas akcepteblaj.

Atentigoj por la partoprenantoj

La a n t i c i p a tendarkotizpago g a r a n t i a s vian partoprenon en la tendare!

Lernantojn ni akceptas n u r sub la gvido de instruistoj.

La tendara manĝokarto antaŭvidas ankaŭ la dietan kaj vegetaranan manĝaĵojn.

Aligilon kaj monon sendu al BANIULAITIS Viktoras: ab.d. 168, Lit; SSR, 235800 Klaipeda. La monon laŭeble bv. sendi kolektive (ne malpli ol tri kotizojn). Antaŭdankon!

Viajn proponojn kaj dezireojn sendu al la prezidanto de la Tendara Komisiono k-de LUKOSEVIČIUS Telesforas, teknikumo, 235240 Joniškėlis, Lit. SSR.

Pli ĝustajn kaj detalejn informojn vi trovos en la dua bulteno, k- iun ricevos ĉiu aliĝinto.

Do, ne plu hezitu kaj senprokraste tuj aliĝu al la 17-a BET!

Tendara Komisiono.

A L I Ĝ I L O al la 17-a BET

(Validas nur kun antaŭpago de la tendarkotizo)

Plenigu preslitere!

Ricevita _____
P/m _____ de _____
Nr. _____

- 1. Familinomo _____
- 2. Persona nomo _____
- 3. Naskiĝdato _____
- 4. Nacieco _____
- 5. Particeco _____
- 6. Profesio _____
- 7. Jaro de esperantistiĝo _____
- 8. Poŝta adreso _____

Postmandate mi forsendis:

a) plenan tendarkotizon sume _____ rb.

b) tendarkotizon por 5 tagoj ekde _____, sume _____ rb.

Aliĝinte, mi konsentas obei la tendaran tagordon kaj disciplinen.

Dato _____ Subskribo _____

DUOBLA FESTO

Dum la lastaj pasintjaraj tagoj al Vilnius komencis venadi gastoj-esperantistoj el ĉiuj anguloj de nia lando. Estas admirinda impetemo oni flugas kelkajn milojn da kilometroj per kune pasigi kelkajn tagojn. Verŝajne, nenie, krom E-ujo, ekzistas io simila. Vilnusa junulara E-klubo "Juneco" jam delonge organizas dum la jaraĝoj E-istan renkontiĝojn. Ĉiujare tiu arango vastiĝas, fariĝas pli kaj pli reprezentata, nun oni jam povas nomi ĝin tutsovetia. Ĉi-tiu estis speciale grava, ĉar kreiĝis du novaj E-familioj. Feliĉon al ili! En la historio de "Juneco" edziĝfestoj ne estas rara evento, sed samtempe du - tio jam estas evento.

Do, la kaŭzoj de la festo: Marite Urbanaviŝiute kaj Staseo Gajdamaviŝius, Graĵina Grabeŝite (ĉiuj el "Juneco") kaj Algis Ojkinis (Kaunas) kaj la tradicia aranĝi novjarajn renkontiĝojn. Jen pro kie estis duoble festo. Venis gastoj el ĉiuj regionoj de SEJM-aktiveco krom el Mezazio, el 16 urboj, 5uniaj respublikoj. La aranĝo estis tre altnivela je E-ista vidpunkto. Inter la partoprenintoj - 5 komitatanoj de SEJM, multaj aliaj konataj aktivuloj. Entute pli ol 60 partoprenantoj el jenaj urboj: Novosibirsk, Ĉelabinsk, Miass, Ufa, Moskvo, Rostov-Don, Ĥarkov, Kievo, Leningrad, Tiŝvin, Tallinn, Riga, Kaunas, Kapsukas, Ŝiauliai, Vilnius. Tiuj, kiuj ne povis veni, sendis laŭ nia adreso kaj laŭ la adresoj de la nuptontoj gratulojn, salutojn. Precipe interesaj estas tiuj de Ivanovo, Vilnusa Sindikata E-kubo, Taŝkent, Novomoskovsk, subtenanto Ĉernov ktp. Dankegon al ili ĉiuj! Korespondantoj antaŭ la Novjaro abundis: poŝtmandatoj, poŝtkartoj, leteroj, telegramoj...

La 31-a de decembro 1975, vespero. Ĉiuj gastoj kaj preskaŭ ĉiuj mastroj jam estas surloke - ĉ. 15 km de Vilnius en Vilaĝo Suderve. Bankedsalono. Biero. Ankoraŭ io. Unue komenciĝas la Novjara festo. La lokojn de la junaj geedzoj okupis falsaj paroj (de inversa konsisto). Paroloj, toŝtoj, dancoj en alia salono ĉe la Novjara abieto, kantoj. Sonas muziko de akordeono, iam de magnetofono. Jen la Novjaro! Sprucas ĉampano, interkisiĝo... La Novjara festo estas finita, tuj komenciĝos E-nupto. Jen finfine ili venas: la du paroj en popolkostumoj, la svato kaj svatino. Sed ne tiel facile estas eniri. Tamen la svato helpe de sia bona lango kaj enhavo de sia sako elaçetas la vojnon, "ĝardeneton", lokon ĉe la tablo. La malĝustaj geedzoj estas forpelataj. Sekvas longa kaj mensoga parolo-fakonto de la svato mensogulo. Sur la muroj - tentaj pentraĵoj. Oni rapidas fiksi ĉion ĉu per magnetofono, ĉu per fotilo. Kaj jen komenciĝis gratuloj, dancoj, specialaj artaj programeroj, belaj vortoj, versoj - ĉio por ili. Jen elpaŝas tiŝvinanoj.

Venis la tempo ^{al la} ~~alria~~ kvarope ankaŭ diri ion. La intervjuo montras, ke atendeblas ne abunda, sed tre altkvalita rikolto. Tamen tediĝas ĉe la tablo.

En la dancosalono la svato kontrolas la junajn edzinojn - ĉu ili scipevas bone danci, ĉu ili estas sveltaj, ĉu estas rektaj iliaj gamboj... Post la dancado de la svato kun la junedzinoj sekvas honoraj dancoj de la junaj geedzoj. La junedzinoj ĝuas specialan atenton de knaboj. Valse, polko... Dancas jam ĉiuj. Jam preskaŭ mateno. Bulgaro el Ĥarkovo plezurigas per kortuŝaj makedonaj kantoj. Kantoj denove, litovaj popolaj, naciaj. Invite por nelonga kaj terura dormeto.

Mateno, la 1-an. Longe kaj persiste oni vekas ĉiujn. Kuracisto kontrolas la sanon de la junedzinoj. Pli-malpli. Denove ĉiuj ĉe la tablo. Tuj komenciĝos pendigo de la svato-mensogulo. Oni legas la verdikton. Oni preparas testamenton. Sed, feliĉe, savas lin ĉampanbotelo, donacita al la juĝantero - nek simbola nek vera pendigo. Per tio la nupto finiĝas.

Rekomenciĝas la Novjara E-renkontiĝo. Ĉiuj veturas al Vilnuso. La junaj geedzoj vojaĝas al Tallinn. Aliaj vespere iras al koncerto Novjara en la Sporta palaco. Poste longa teumado, kantado, dancado, ludado en komunloĝejo. Ĉio laŭ popoloj moroj, kutimoj, ritoj. Matene ekskurso tra la urbo. La komitatanoj dum tiu tempo kunsidas. Vespere komuna kunveneto, fermo de la renkontiĝo. Jam oni komencas forveturadi hejmen. Kelkaj movadaĵ demandoj, informo pri la enhavo kaj rezultoj de la komitatkunsido. Komenciĝis "postkongreso". Malfrua vespera kaj nokte programoj estas la samaj.

La sekvan tagon por la dezirantoj estas ekskurso al Kaunas, aliaj iras al organa koncerto en la Katedralo. Sekvas veturo al nova regiono de Vilnius Lazdinai, la samtittola restoracio. Vespere en la loĝejo de V.Š. oni provas sensukcese fintrinki la bieron. Diskutado pri la metodiko de instruado, aliaj movadaĵ demandoj, personaj interparoloj.

La lasta gaste forveturis la 7-an de januaro. Tia proksimume kronika bildo estas. Konkludojn faru vi mem.

P.Jegerovas (Vilnius).

La renkontiĝo en reflektaj

Litovoj havas strangan tradicion: dum nupto oni nenion trinkas kaj manĝas, pli ĝuste, trinkas nur bieron kaj manĝas nur pizon. Se konsideri, ke ni veturis al Vilnius dum tuta tagokto kaj nenion manĝis, tia tradicio ŝajnis al ni domaĝa. Krom tio k-do Gilinskij (diable lin manĝe!) alveturigis el Leningrado "bengalajn fajrojn", kiujn ni kun grandega plezure forbruligadis, post kio evidentigis, ke nia pizo jam ne estas manĝebla, kaj la biero ne estas trinkebla pro densa tavolo da cindro de tiuj ĉi fajroj.

Tamen la renkontiĝo entute al mi ekplaĉis.

L.Novikova (v.Ilek Ĉelabinska rg.).

Tutan tagon la 30-an de decembro ni promenadis laŭ stratoj de nia ĉefurbo Moskvo: vizitis magazenojn, frizejojn (tia ja estas la virina karaktero). Nur vespere ni, preskaŭ sen fortoj, eksidis en aviadilon kaj, senmove kuŝante en la foteloj, elflugis al Vilniuso.

La 31-an de decembro ni aĉetis biletojn por la rea vojo, antaŭe menditajn de gastemaj mastroj por ni. Vilniusanoj forveturis al Sudarve por ĉion prepari al la Novjara festo. Miŝa Gilinskij enmanigis al ni mapon de la urbo, Vitas klarigis, kion kie trovi, kaj ni daŭrigis nian konatiĝon kun la urbo. Certe, la vojon ni perdis! Ni komencis kaptadi taksion, sed ĝi ne estis kaptebla. Fin-fine apud ni haltis ies propra aŭtomobilo. Longe-longe ni serĉadis la straton Daŭkanto, kie troviĝas la loĝejo de Silas. Kaj trovis... kun helpo de la ŝoforo.

...Je la 10 hore ni renkontis la Novan jaron laŭ la ufa tempo kaj poste... ni gratulis unu la alian okaze de la nova 1976 jaro kaj interkisis kun genajbaroj. Ni dancis, ludis, kaj matene estis jena bildo: en malgranda ĉambro en dermosakoj kuŝis pli ol 25 personoj. Kaj la tutan nokton ni tradormis sur unu flanko, ĉar pro la malvasteco nek turniĝi eblis nek profunde spiri. Kiu ne sukcesis okupi lokon promenadis dum nokto laŭ koridoro. Tage daŭrigis la festo...

Ĝis revido, gastema Vilniuso! Ni nepre ankoraŭ vizitos vin.

A.Silantjeva (Ufa).

CRRR-14 EN MOSKVO

La 14-a CRRR okazis en Moskvo la 7-9 de novembro 1975. Al la Renkontiĝo venis reprezentantoj el Leningrad, Tula, Kolonna, Pskevo, Ivanovo kaj Kamenka, Ĵurjevco de Ivanova regiono. Moskvanoj ĝoje kaj varme akceptis siajn gastojn, al kiuj ili proponis varian programon, prizorgis bonajn kondiĉojn por la laboro kaj ripozo.

Dum la CRRR-14 okazis 3 laborkunsidoj, dum kiuj oni traaŭskultis raportojn pri E-agado de SEJM-klubo, skizis planojn por estonto. Multon novan kaj utilan eksciis ni el la prelego de S.N.Kuznecov "Esperantologio - kio ĝi estas?". Ankaŭ interesa estis la rakonto de D. L.Armand pri la 60-a UEA-Kongreso, ilustrata per slajdoj. Gravan lokon en nia interparolo havis la proksimiĝanta XXV-a Kongreso de KPSU, pri ĝia inda renkonto kaj pri tio, kion povas kaj devas enmeti E-istoj en tiun gravegan eventon. Ni same atentis la partoprenon de SEJM-klubo en MEM kaj Ĝenerale en la socipolitika vivo de nia lando.

Eksterkunvena tempo pasis senrimarke rapide: bankedo, vizito al la muzeo de la historio kaj rekonstruo de Moskvo, al la muzeo de Maĵakovskij, spektado de "Drama kanto" en la teatro je la nomo de Puŝkin... Kun ĝoje akceptis la E-istaro la montron de slajdoj pri SEJT-17, BET-16, pri Jemeno, kiujn antaŭnelonge vizitis k-do V.Samodaj.

La CRRR-15 okazos en Ivanovo dum majaj festotagoj.

L.Goreva, prez-ino de Ivanova E-klubo.

"PARNASO-75", "PARNASO-76"

Jam tradicia poezia konkurso de Riga Junulara E-klubo havas pli kaj pli da partoprenantojn. Poetoj el Jugoslavio, Pollando, Hungario, GDR, Nederlando, FRG, Bulgario, Rumanio kaj multnombre el Sovetunio sendis siajn plej interesajn verkojn. Alta jurio havis neatendite grandan kaj interesan laboron. Longe ili ne povis decidi pri la rezulta distribuo de la premioj kaj kiam jam volis anonci la venkintojn en januaro 1975, venis ankoraŭ verkoj de kelkaj diligentaj aŭtoroj, kiuj tute ŝanĝis la aferon. Sed nun la fina decido estas jena:

1. Kunigi ĉiujn verkojn, senditajn dum la periodo de aprilo 1974 ĝis oktobro 1975.

2. Alta jurio decidis unuan ^{premio} ~~premio~~ ne aljuĝi, sed premi per du duaj premioj aŭtorojn: G. Gercikov, V. Silas - Sovetunio; per tria premio - H. Trunke (FRG).

La organizantoj esprimas sinceran dankon al ĉiuj partoprenintoj de "Parnaso-74, -75" kaj deziras grandan sukceson en la nova konkurso "Parnaso-76".

Celo de la konkurso "Parnaso-76" estas pliaktivigi junajn E-poetojn kaj ĉiujn, kies koro junas, kiuj ne povas silenti pri la beleco de nuna vivo, amo, mirinda naturo kaj E-movado. La plej bonajn verkojn oni publikigos en "Amikeco". Oni akceptas ĉiuspecajn originalajn poeziajn verkojn laŭ libera temo ĝis la 15-a de junio 1976. Sendu konkursajn verkojn al Aristida Medinš: Riga-2, Ed. Smilga, 34-5, 226002 Latvio, USSR.

Valeraj premioj atendas vini! Bonan inspiron!

Poezia fako de Riga Junulara E-klubo.

I N F O R M O J * A N O N C O J * P E T O J * S C I I G O J

NOVAJ SUBTENANTOJ DE SEJM
(aldonu en la Sekretarian Libron)

- 33. NATINJ A.J. - 683006 Petropavlovsk-na-Kamĉatke, bulvar Ribackoj slavi, 3-10.
- 34. E-klubo de Petropavlovsk-na-Kamĉatke - adreso la sama.
- 35. KULIKOV Vs.V. - 644007 OMSK-7, Sazanova, 33.
- 36. CELISĈEVA R.V. - 614900 PERMJ, ul. Ŝiŝkina, 19-86.
- 37. Safronova E.A. - 453109 Sterlitomak, I. Nasiri, 3-75.
- 38. FAIZOVA F.H. - 456910 SATKA-3 Ĉelabinskoj obl., Metallurgov, 13-64.
- 39. KULAKOV I.F. - 394028 VORONEJ-28, Irkutskaja, 21-28.
- 40. NOVIKOVA L.L. - 456032 s. ILEK Ĉelabinskoj obl., Aŝinskij r-n.
- 41. BARTASEVIČIUS L. - 235030 KEDAINIAI, abĵa 30, Litova SSR.
- 42. VOJNAROVIČ A. - 343871 g. AVDEEVKA-3 Doneckoj obl., ul. Gagarina, 23-37.
- 43. STRIUJAS V. - 235280 BIRJAI, Radvilos, 4-5, Litova SSR.
- 44. BESKAREV V.P. - 603009 GORKIJ P-9, ul. Rezervnaja, 11-3.
- 45. VAITKUS A. - 233009 KAUNAS, Darĵelio, 11-45, Litova SSR.
- 46. HANS ANSO - 202902 VASTEMEISA, Viljandi rajoon, Estona SSR.
- 47. KAPUSTIN L.G. - 603115 GORKIJ, Nevzorovoj, 72-7.
- 48. KOTELNIKOV A. - 400015 VOLGOGRAD, ul. G. Koroljovoj, 9-19.
- 49. AUKSTIKAINIENE Br. - PASVALIS, Janonio-27, Litova SSR.
- 50. ZDROGOV J.N. - 453623 s. GUSEVO Abzelilovskogo r-na Baŝkirskoj ASSR
- 51. GRINEVIČ V.I. - 273000v KODIMA Odesskoj obl., ul. 20 let Oktjabra, 8.

Bv. korekti erarojn en la Sekretaria Libro:

P. 7 Rimarkoj - punkto 9 tekstu: "Ne malpli ol 45 ekzempleroj";
aldonu punkton 10: "Netu la kursgvidantojn, daŭron de la kurso".

P. Jegorovas, Sekretario de SEJM.

Estas principe decidite organizi apartan tradukistan kurson antaŭ la SEJM-Konferenco. Lekurso okazos sur ŝipo, navigonta de Moskvo ĝis Leningrad (4-5 tagojn). Detaloj (tempo, kosto...) estas sciigotaj pli poste.

Informas A.Gončarov.

* * * * *

GRAVE!

La redakcio de la revuo "Soveta Unio" aperigos artikolon pri E, se venos demandleteroj el eksterlando. Proponu al viaj korespondantoj sendi al la redakcio (Moskvo, ul. Moskvina-8, "Soveta Unio", kulturfako, al V.B. Illeŝ) diversajn demandojn pri la E-movado en USSR.

V.Aroloviĉ (Moskvo).

* * * * *

Mi publikigis en la Voroneĵa junulara gazeto "Molodoj kommunar" tri artikoletojn pri E: "Esperanto" (24.8.74), "Vstreĉa a poligloto-m" (1.11.75) kaj "Neobiĉnij tajnik" (16.12.75). Du artikoletoj atendas sian aperigon. Sed mi estas preta ĉiumonate publikigi po unu-du artikoletojn pri E-to aŭ gvidi konstantan rubrikon.

Mi petas vin: turnu vin al la redakcio de la gazeto "Molodoj kommunar" (394740 Voroneĵ-centr, pr. Revoljucii, 33) kaj petu miajn artikolojn samtempe proponante al ĝi artikolojn el viaj lokaj gazetoj por ke instigi la redakcion al pli bona rilato al Esperanto.

I.Kulakov, subtenanto de SEJM (Voroneĵ).

* * * * *

Kroatia E-Junulara Asocio (KEJA) petas helpon. Por kroni revigliĝon de junulara E-agado KEJA organizas en majo 1976 Internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. SEJM-klubo kaj subtenantoj de SEJM estas petataj sendi deseĝnaĵojn de infanoj 4-13 jaraĵ laŭ la adreso:

Kroatia Esperanto-Junulara Asocio, 41000 ZAGREB, Amruŝeva 5/1, p.p. 499, Jugoslavio.

A.Gončarov (Barnaul).

* * * * *

MOSKVO

Moskva virina grupo en la dua trimestro de 1976 organizas ekspozicion de infanaj pentraĵoj. La plej bonaj el ili estos senditaj al la IV-a Barcelona ekspozicio. Temoj por la pentraĵoj estas tiaj:

1. Mia granda belega Patrujo;
2. Satata fabelo fare de H.Andersen;
3. Mia patrino.

La aĝo de partoprenantoj povas esti de 6 ĝis 14 jaroj. Infanoj ĝis 8 jaroj povas pentri per ajna maniero. La pli aĝaj devas pentri nur per akvofarboj.

La dimensio de la pentraĵoj devas esti en limoj de 25x25 ĝis 30x40 cm. La pentraĵojn ni petas glui sur kompakta papero. Sur la malantaŭa flanko devas esti skribitaj la titolo de bildo, nomo kaj aĝo de la aŭtoro kaj la adreso de la organizaĵo, kiu sendas la bildon.

Ni petas sendi la deseĝnaĵojn ne pli malfrue ol ĝis la 1-a de junio 1976 laŭ la adreso:

117071 Moskvo, str. Malaja Kaluĵskaja, d.12, loĝ.24, G.Armand.

La kunvenoj de MIEK okazos ne je la 14-a, sed je la 18-a horo.

Benvolu noti la novan ofican telefonon de V.Aroloviĉ: 111-78-26.

* * * * *

UFA

En Ufa E-klubo estas preparitaj

1. Kinofilmo pri REVU-11 kaj SEJT-17 (16 mm);
2. Unu serio de lumbildoj pri SEJT-17 kaj REVU-12.

TALLINN

Novaj libroj

"Tallinn" - 96 paĝoj, lakite - 1,58 rb., polietilenkovrite - 1,82 rb., 35000 ekz., eldonejo "Esti Raamat" Tallinn 1975.

Malgranda kolorbilda albumo pri Tallinn, pri ĝia malnova kaj novaj urbopartoj, monumentoj, kultura vivo, industrientreprenoj ktp. Multa teksto estas en la estona, rusa, angla, germana, finna kaj Esperanta lingvoj.

Sovetaj E-istoj povas mendi ĝin pere de lokaj librovendejoj (okaze de ilia konsento), kiu direktu siajn mendojn al "Estiknigotorg", Tallinn-90, Pärnu mnt, 10; pere de "Libre-per-poŝto", Tallinn-90, p.k. 199; pere de Tallinna E-Klubo laŭ la adreso: 200001 Tallinn-1, Narvskoe ŝosse 23-5, J.Ojalo.

El la pli fruaj eldonaĵoj estas ankoraŭ riceveblaj: J.Ojalo "Esperanto keele ĉpik" (31 kop.), E.Krusten "Okupacio" (38 kop.), "Kalevipeeg" (60 kop.).

Kroniko

La 27-29 de januaro 1976 Tallinn vizitis 10-persona grupo de finnaj E-istoj, reprezentantoj de la maljuna kiel ankaŭ juna generacioj. En la grupon apartenis i.a. E-akademiano honora membro de UEA prof. Vilho Setälä, prez. de la Finna Esperanto-Asocio Oskari Lehtivaara, prez. de la Finna Fervojistaj E-societo Niilo Narvala, estona-finna geparo Sigrid kaj Lasse Kivistö kun sia 7-monata filineto Tiina-Mari. La 28-an de januaro okazis renkontiĝvespero kun reciprokaj paroladoj kaj komuna koncerto. La 29-an de januaro oni preparolis la movadajn problemojn en ambaŭ landoj kaj eblecojn por reciproka prikultura kunlaboro.

J.Ojalo (Tallinn).

* * * * *

RIGA

La 20-an de decembro 1975 en Riga okazis vespero, dediĉita al D-ro L.Zamenhof kaj Tago de Esperanto-libro. Prelegis s-anino L.Jevsejeva. Siajn versaĵojn ĉeklamis s-ano Harijs Skuja, koncertis ensemble de la blindula rondeto "Internacia amikeco". Estis aranĝita riĉa ekspozicio de E-aĵoj, poste okazis amuzvespero. Ĉeestis ankaŭ gekursanoj de E-kurso.

La E-poetino Elvira Lippe gajnis la duan premion (arĝentan medalon) en la literatura konkurse "Patrolo-75", organizita en Italio.

S-anino S.Neilande en la konkurse de Pola Radio gajnis la ĉefpremion - 10-tagan ekskurson tra Pollando.

En la III-a Internacia ekspozici-konkurso de infandeseĝnaĵoj, organizita en Barcelono (Hispanio), partoprenis ankaŭ 5 infanoj el Riga. Ĉiuj ricevis premiojn.

Pri Esperanto en la 8-jara lernejo de Jaŭnaŭce prelegis s-ano Talis Bercis (Rigo); samtempe estis organizita riĉa ekspozicio de E-aĵoj. Pri la aranĝo aperis informo en la regiona tagjurnalo "Padomju zeno" (Soveta lando).

La gvidantoj de rondetoj en Jaŭnaŭce petas helpon kaj konsilojn pri E-instruado kaj rondetlaboro en vilaĝaj lernejoj. Estas peto sendi ankaŭ salutpoŝtkartojn. La adreso: Latva SSR, Saldus raj. - 229493, Jaŭnaŭces 8-jara lernejo, E-rondeto.

S.Neilande, L.Berzina (Riga).

* * * * *

Por mia diploma laboro kaj por eventuala instruado de la lingvo en lernejo mi bezonas konatiĝi kun lernolibro "Esperanto programita". Kiu havas ĝin, bv. informi min: Bingelis Vytautas, Umedžiu-123, Vilnius 232053.

V.Bingelis (Vilnius).

D Ĥ Ĥ I R A S K O R E S P O N D I

Adresojpde junaj esperantistoj, kiuj volas korespondi kun polaj esperantistoj kaj krei kolektivajn ligojn kun E-klubo:

1. Stefan Lulkiewicz (26-jara instruisto) - ul. Tuwima 63/6, PL-59-902 Zgorzelec, Pollando.
2. Esperanta studgrupo de Jagiellona Universitato, Reymonta 11, PL-30-059 Krakow, Pollando.
3. Anna Nowak (studentino) - 40-082 Katowice, str. Sobieskiego 12/19 Pollando.
4. Krojnowski Stanislaw (23-jara) - 85-324 Bydgoszcz, ul. Koszarowa 9a/319, Pollando.
5. Skelta Esp.-Rondo, ul. Weteranow 3, PL-20-038 Lublin, Pollando.
6. Czeslawa Kozłowska (21-jara) - ul. Olsztynska 4/8, PL-14-510 Orneta, Pollando.

S. Neillande, estrino de la Koresponda fako.

S-ino Walkiria Milián Cárdenas, Avenida 85 N^o 10005, Güines, Prov. Habana, CUBA - deziras korespondi ruslingve pri moderna musiko, gramofondisko, E-kanzonoj, modrevuoj, romanoj, fotoj de kinoaktoroj ktp.

V. Gakalenko (Tifvin).

INFORMA FOLIO DE LA SCIENCOTEKNIKA FAKO DE SEJM

N^o 4

Februaro 1976

Al la Teknika sekcio de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, Moskva.

Karaj samideanoj, fine de marto 1975 okazis en Mělník (Ĉeĥoslovakio) labora kunveno de reprezentantoj de la Esperanto-movado el la socialismaj landoj. Ĉe tiu okazo la Teknika sekcio de ĈEA (Ĉeĥa Esperanto-Asocio) transdonis al ĉiuj partoprenantoj leteron kun peto pri kunlabore.

Novan impulson por nia agado donas al ni la Proklamo de Helsinko, kies parton, temantan pri nia agadkampe, vi ricevis antaŭnelonge en Esperanta traduko de ĈEA.

Nia sekcio pritraktis la aferon kaj konstatis, ke

1. ni devas havi taŭgajn terminarojn;
2. ni devas komenci eldonadi E-lingvan teknikan nomenklaturon, uzatan ekz. en la ŝtatoj de la Konsilantaro de Reciproka Ekonomia Helpe;
3. ni devas eldonadi komunan informilon;
4. ni povus eldonadi fakajn artikolojn kaj librojn;
5. ni povus interŝanĝi prelegantojn pri fakaj aferoj en entreprenoj en aliaj landoj.

Al la punkto 1.: La Teknikaj sekcioj de ĈEA kaj de AE SSR (Asocio de Esperantistoj de Slovaka Socialisma Respubliko) prilaboras politeknikan ~~registron~~ ^{terminaron} kaj intencas baldaŭ eldonadi terminarojn por unuopaj teknikaj fakoj. Kiel konate, temas pri enorma* labore, realigata fare de malmultaj volontuloj. Tie mankas pli ampleksa internacia kunlabore. Certe, en aliaj landoj de la socialisma ŝtataro ekzistas jam terminaroj por kelkaj fakoj, kaj estus dezirinde disponigi tiujn laborojn al komuna utilo.

Al la punkto 2.: La internacia praktiko uzas, kaj la Proklamo de Helsinko antaŭdiras farmadon de regiona grupiĝo por pli bone realigi la celojn de la Proklamo. El nia vidpunkto la unua praktika paŝo estas eldonadi poparte la tutan nomenklaturon teknikan, uzatan en la ŝtatoj de la Konsilantaro. Tie estas ankaŭ kaŭzo, pro kio ni turnas nin ankaŭ al la ekstereŭropaj esperantistaj organizaĵoj.

Al la punkto 3.: Antaŭ ol estos eble eldonadi komunan informilon, ni rekomendas sendadi proprajn periodaĵojn al la ceteraj membroj de nia grupiĝo.

Al la punkto 4.: Pri intencoj eldoni sciencajn aŭ teknikajn publikajojn estu informataj antaŭe la aliaj membroj. Pre tio estus bone havi registran centron.

Al la punkto 5.: En nia lando montriĝas ebleco de kunlabore kun entreprenaj filioj de la Ĉeĥoslovaka Scienc-Teknika Societo. En kelkaj entreprenoj estas konvenaj kondiĉoj por fruktodona kunlabore: prelegoj de eksterlandaj fakuloj, interŝanĝo de informoj, informado pri raciigo de produktado ktp.

Ni citas ĉi-tie nur kelkajn pensojn por nia estonta kunlabore kaj samtempe atendas, ke en via lando aperos ankaŭ alia bezono aŭ formo de kunlabore.

Ni petas vin, bonvole transdoni ĉi tiun leteron al la laborgrupo en via lando, kiu okupiĝas pri sciencaj aŭ teknikaj demandoj. Nian alvokon ricevas ankaŭ la teknikaj sekcioj en Bulgario, Hungario, Jugoslavio, GDR, Kubo, Mongolio, Pollando, Rumanio, Vietnamio.

*Enorma = grandega, abunda, -- Red.

Desirante al vi tutkore sukcesojn al via laboro, ni atendas vian respondon al la adreso de la sekretario de la Teknika sekcio de ĈEA: Jifí Laube, Alej Rudé arm. 811, CS-413 01 Roudnice n.L., Ĉeĥoslov.

Jifí Laube
(sekretario de la
Teknika sekcio de ĈEA).

Dr.ing. Ludvík Fritsch,
ul. Maxima Gorkého 11, ~~370~~
370 01 České Budějovice

(prezidanto de la
Teknika sekcio de ĈEA).

SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ - REZULTO DE PERSISTA LABORO

La esperantista socie sporade jam renkontis en la gazetaro la nomon de la Budapeŝta Esperanto-grupo "Konkerdo", kiu jam dum tri sinsekvaj akademiaj jaroj regule aranĝis dufoje ĉiumonate siajn **Sciencajn Vesperojn**.

La membroj de la grupo en 1972 konstatis, ke la nivelo kaj la ofteco de aplikado de Esperanto por sciencaj celoj estas tute ne kontentiga, kaj decidis, ke laŭ siaj povoj ĉi tiun gravan aferon ili provos iom antaŭenpuŝi.

Ekde la novembro de 1972 ili regule aranĝis Sciencajn vesperojn kun altnivelaj prelegoj kaj diskutoj pri la plej diversaj branĉoj de la scienco. Dum tri akademiaj jaroj, ĉefe en la grupo, sed ankaŭ en la Sciencia Sesio dum la Hungarlanda Esperanto-Kongreso en 1974 kaj eĉ ĉe la Internacia Somera Universitato en Beogrado en 1973 kaj ĉe ILUS-Konferenco en Paderborn, FRG, en 1974, la membroj de la grupo prezentis sume ĉ. 60 prelegojn.

Paralele kun tio ankaŭ alia Budapeŝta grupo, nome la **Medicina**, komencis aranĝi Sciencajn Vesperojn, kaj ankaŭ tie estis prezentitaj tre valoraj prelegoj pri la medicinaj sciencoj.

Sporade ankaŭ en aliaj kluboj en la lando oni organizis, aŭskultis kaj pridiskutis prelegojn pri pli-malpli sciencaj aŭ popularsciencaj temoj.

Ĉi tiuj prelegoj klare pruvis la taŭgecon de Esperanto por aplikado al scienca informo-interŝanĝo, sed pruvis ankaŭ, ke multaj altnivelaj fakuloj tien, komprenis kaj eĉ faras ĉion eblan por evoluigi ĉi-rilate la lingvon kaj samtempe uzi ĝin kiel informo-perilon.

Post ĉiuj ĉi eventoj jam pli kaj pli sentiĝas, ke nova paŝo devas sekvi.

Vere, printempe de 1975 la Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, kiu ĉiumonate akurate aperigas sian bultenon, oferis aperigon de parto de la prezentitaj prelegoj kaj apartan kajeron aldonitan al iu numero de Budapeŝta Informilo.

La rezulto estas 48-paĝa, riĉenhava, grafike kaj fote ilustrita kajero "Sciencaj Komunikaĵoj - Julio, 1975" kiel aldono de Budapeŝta Informilo al sia numero de Julio-Aŭgusto, 1975.

La kajero enhavas du specojn de artikoloj. Al la unua speco apartenas dekkvin sciencaj kaj popularsciencaj artikoloj, al la dua naŭ informaj kaj recenzaj skribaĵoj.

Laŭtame la sciencaj kaj popularsciencaj artikoloj montras tre vastan spektren, ĉar ĉiu ĉefbranĉo de la scienco estas reprezentata per kelkaj studoj.

Koncerne la informajn artikolojn, la leganto verŝajne kun surprizo trastudos la plenumitan trijaran programon de la Sciencaj Vesperoj en la grupo Konkerdo, kies materialo plenigus almenaŭ tri pluajn kajerojn, kvankam la aperinta Sciencaj Komunikaĵoj mem enhavas pli ol 200 mil literojn, se ne paroli pri la bildoj. Ni aldonu, ke ankaŭ en la Medicina grupo pretiĝis manuskriptoj de trioble pli da prelegoj al publikigitaj en la Sciencaj Komunikaĵoj.

Retajpita el "Hungara Vivo" N^o5, 1975.